Baldaŭ venos la somero, la sezono de ferioj kaj vojaĝoj. Verŝajne multaj turistoj vizitos nian landon. Espereble, inter ili troviĝos Esperantistoj. Ni do ĉiam portu la stelon, por ke alilanda vizitanto nin ekvidu, kaj komprenu, ke ni estas samideanoj.

Tamen la eksterlanda Esperantisto ne demandos al ni pri la stelo aŭ pri la lingvo. Li ĝin uzos, por demandi pri aliaj aferoj. Eble li komencos jene: *Bonan tagon! Ĉu vi parolas Esperante?* Demando ŝajne

iom stulta; ĉar se ni portas la stelon, ni per tio montras, ke ni estas Esperantistoj; kaj se jes, kial demandi, ĉu ni parolas Esperante?—Aŭ ĉu tamen la demando efektive estas necesa?

Multaj laboras por nia movado, propagandante, varbante, kolektante subskribojn por UNO, k.t.p. Tamen povas okazi, ke tiuj samaj personoj faras tute malbonan impreson, kiam iu venas kaj provas paroli kun ili Esperante. Ĉar se ili respondas nur pene kaj balbute, la ĉeestantoj forte dubos pri la facileco de la lingvo. Tre fuŝa reklamo!

La sperto instruas, ke ni ne faru al ni tro grandajn iluziojn, renkontante verd-stelulon. Efektive, la stelo ne diras, ĉu li estas flua parolanto, aŭ nur balbutulo.

Sed kial ne ĉiu samideano ellernas Esperanton? En kelkaj kluboj la membroj parolas preskaŭ sole Norvege. Ĉu do estas tiel malfacile paroli Esperante? Tute ne! Tamen, oni devas fari komencan, kaj ĝuste la komenco ŝajnas malfacila. Okazas eĉ, ke la klubestro sabotas Esperanton, kaj parolas Norvege, "por ke ĉiu komprenu"! Karakteriza estas unu klubraporto en ĉi tiu numero: unue oni priparolas "aferojn aktualajn", kaj nur poste uzas la belan lingvon (do la lingvo ne estas afero aktuala!).

Konsentite, ne estas amuze interparoli kun mallerta Esperantisto. Post kelkaj provoj oni perdas la paciencon, kaj transiras al la Norvega. Tiumaniere la konversacio fariĝas pli facila—tamen malpli valora. Sekve de tio, iom post iom eĉ la lertuloj komencas paroli nur Norvege. Kaj se iu proponas Esperanton kiel devigan lingvon en la klubo, li renkontas tiom da kontraŭstaro, ke li tute perdas la kuraĝon.

Facile ni predikas, ke oni enkonduku Esperanton en la lernejon, en la radion, en la turismon, k.t.p. Sed ni malpli entuziasmas pri enkonduko de Esperanto en la Esperantan klubon. Strange!

Nia moto estu: *Esperanto en la Esperantan movadon!*

El "Norvega Esperantisto" (Aprilo 1946), mallongigite.

Amika Internacia Renkonto, Angers, France, 13–22 July, 1947. As it is very difficult for most French Esperantists under present conditions to go to Bern, this Congress has been arranged as a second-best. For details of a most interesting programme write F-ino Nouais, 28 Boulevard Descazeaux, Angers, Maine et Loire.

LA VALO DE VIZIO

Iam estis junulo, kiu havis la talenton de vortoj. Li ludis ilin, ĵonglis ilin; li ŝnure liniigis ilin kiel briletantaj bidoj (globetoj). Li verkis pri amo kaj morto kaj malamo, pri ĝojo kaj malĝojo kaj doloro, kaj pri multaj aliaj temoj, pri kiuj li nenion sciis; sed lia renomo vastiĝis tra la lando, kaj li fariĝis fiera.

Iun tagon okazis, ke li renkontis maljunulon, filozofon eminentan kaj tre saĝan; kaj en sia aroganteco la junulo sub ŝajnigo de humileco volis havigi al si lian laŭdon. "Mia filo," respondis la saĝulo, "viaj vortoj estas tiel belaj, ke mi tiom pli bedaŭras, ke ili ne vivos."

"Ne vivos?" ekkriis la junulo. "Kion ci volas diri, sinjoro?"

"Ili ne havas animon," respondis la saĝulo, kaj daŭrigis sian vojiron.

"Estas malvere!" kriis la junulo. "Miaj vortoj nepre devas vivi. Ili ja vivos—miaj belaj vortoj! Prefere mi mem mortus."

Tamen li estis malserena kaj elpaŝis en la mondon por scii, kia povus esti tiu "animo". Avide li demandis al tiuj, kiujn li renkontis dum sia pilgrimado.

"Vortoj!" ekkriis muzikisto. "Se la termondo estus hejmo perfekta, oni ne bezonus vortojn: la lingvo de la ĉielo estas Muziko."

"Vortoj" diris artpentristo malŝate, "plej bone restu neskribitaj. Ĉu vi volus revivigi la pasintecon? Ĉu vi volus transigi viajn pensojn en la estontecon? Nu, ilin bildigu. Vortoj ne multe valoras."

"Vortoj" ploris la funebranto, "portas neniom da konsolo. Ili estas simboloj delonge senpovaj. Malĝojo ne havas voĉon: kunsento estas muta."

"Vortoj!" ridis amindumanto. "Kiel necesas vortoj, kiam koro parolas al koro, kaj okulo al okulo?"

Do estis la junulo nemezureble senkonsola. "Ĉu vortoj estas nur nulo?" li meditis, "nur senvive naskitaj? Tamen la vortoj de la eminentuloj kaj saĝuloj de la pasinteco ankoraŭ vivas. Kiu instruis al ili la saĝon? Ho! ke mi trovu instruonton, por ke miaj vortoj vivu!" Kaj en sia malespero li kriis laŭte.

Tiam parolis la Silento . . .

"Mi estos tre pacienca" la junulo respondis, klinante la kapon. "Mi ne ribelos. Nur instruu min, ke mi donu al miaj vortoj tion, sen kio ili devas morti."

Dum multaj jaroj la junulo loĝis en la lando de Silento. Li suferis multajn aferojn kaj estis muta, ĝis fine venis tago, kiam li sentis, ke li nepre devas paroli—ke estas komisiita al li mesaĝo, kiun la mondo devas aŭdi. Li alvokis la vortojn, kiuj

antaŭe estis liaj sklavoj, kaj ili venis obee, ĉar li estis ilia mastro kaj havis komandon super ili. Kaj ĉi tiun fojon la mondo aŭskultis. "Vortoj tiel belaj", ĝi diris, "devas vivi por ĉiam!" Sed al la viro estis indiferece, ĉu liaj vortoj mem vivos, ĉu ili mortos. Ili estis nur la ekstera vestaro de la spirito: ilia animo, li sciis, estas tiel senmorta, kiel lia propra.

MARY SOONES

trad. A. J. HOWARD HULME

LA PETSKRIBO

Jen la ciferoj ĝis 10 Aprilo:

Nederlando ..46621	Portugalujo ..	3322	
Britujo ..22182	Germanujo ..	3087	
Bulgarujo ..21460	Aŭstralio ..	2850	
Francujo ..20373	Nov-Zelando	2495	
Svedujo ..16515	Italujo ..	2204	
Ĉeĥoslovakujo	15821	Egiptujo ..	1761
Jugoslavujo ..11740	Svisujo ..	1269	
Norvegujo ..11732	Maroko ..	1018	
Danujo ..	7304	Grekujo ..	473
Aŭstrujo ..	6970	Urugvajo ..	460
Finlando ..	6325	Irlando ..	449
Polujo ..	5590	Palestino ..	445
Argentino ..	5370	Hispanujo ..	274
Belgujo ..	5214	Kanado ..	257
Usono ..	4368	Ceteraj lokoj..	593
Brazilo ..	4129		
Islando ..	4065	sumo	240325
Hungarujo ..	3589		

Ni esperas, ke legantoj daŭrigos la ĥonan laboron. Pluaj folioj por subskribo estas haveblaj senpage ĉe la Oficejo.

REMEMORO

Ankoraŭfoje mi per paŝoj pezaj

Reiras al la monto da rubaĵo:

Salutas min mur-restoj kampomezaj,
Ruinoj de l' iama posedaĵo.

Ĉi tie ludis iam la infanoj,

Kaj en la ĉambroj sonis ĝojo riĉa;

Jen sidis mi kun plumo en la manoj—

Mi estis kvazaŭ reĝo rev-feliĉa.

Ho, kiom amis mi objektojn ĉiujn,

La kunligitajn firme al la koro!

Ne plu revidos mi karaĵojn tiujn,

Pri ili restas nur la rememoro!

Silentas nun la rondo ruinara,

Nur malproksime sonas urba bruo:

Jen iam estis mia hejmo kara,

Kaj en la domo estis ĝoj' kaj ĝuo.

La karaj arboj portas foliaĵon,

En la ĝardeno kreskas ia floro.

Rigardas mi iaman posedaĵon,

Sed al mi restas—nur la rememoro!

FRIEDRICH HAHN, Bremen.

INTERNATIONAL LANGUAGE CLUB CROYDON

To commemorate their recent victory in the Town Planning Public Enquiry, and in appreciation of the work for international friendship carried on by its founder during the past nine years, the Club has decided to erect a large panelled shield with inscriptions in various languages. Among these in Esperanto, and the text runs—

"Ni, la anoj de la Lingva Klubo Internacia, deziras festi kun S-ro Terence J. Driscoll la venkon de la Klubo, kaj esprimi nian admiron pro lia kuraĝo kaj entreprenemo dum la lastaj naŭ jaroj. Ni konvinkigis pri la valoro de ĉi tiu eksperimento en "internacia vivado", kaj promesas nian tutkoran subtenon fari la Klubon vera Internacia Centro por frateco kaj pli bona kompreno inter la Popoloj de la Mondo".

The work is in the hands of an artist, and embellished with the emblems and flags of many nations, including the Green Star, will hang in the Club's lobby as a permanent memento.

CHAS. P. COCKS.

EL SIMIA PROVERBARO

(Ni trovis la jenan manuskripton en la skribo de la mortinta S-ro William Bailey. Kiu ĝin verkis, ĉu li aŭ alia, ni ne scias.—Red.)

- 1—Ne haltu por vin grati, kiam la arbaro brulas.
- 2—Malplena mano facile trairos truon, el kiu plena ne povos veni.
- 3—Ne ĉiam bona kerno en bela ŝelo.
- 4—Kiam diras homino "Ho! kia bela pelto!" forkuru sen adiaŭo.
- 5—Se vi flustris al amiko "Mi havas bonan kaŝejon", elserĉu alian.
- 6—Ridu antaŭ saltego, poste vi eble ne povos.
- 7—Ju pli alloga la enirejo, des pli pripensu la eliradon.
- 8—Pli bone unu nukso en la buŝo, ol tri en la mano.
- 9—La lasta banano estas tiu, kiu kostas vian vivon.
- 10—La branĉo sekiĝis: lasu al alia ĝin provi.
- 11—Dolĉa la mielo, sed akraj pikiloj ĝin gardas.
- 12—La plej bonaj fruktoj estas ĉiam ne atingeblaj.
- 13—Memoru, ke serpento kuras sen piedoj, kaj ke sago flugas sen flugiloj.
- 14—"Fortulo forrabis de mi nukson!"
Do elektu malpli fortajn kunulojn.
- 15—"Venu vidi en mia spegulo, kiel bela vi estas", flatas la malsata krokodilo.
- 16—Kia kuraĝulo! Li tirus la voston de leono mortinta.

- 17—Ju pli multaj la buŝoj, des pli malgranda la manĝo.
- 18—Tro malfrue rekoni de interne kaptilon.
- 19—Amiko vin pinĉas—ridu! Malamiko vin karesas—gardu!
- 20—Ĉe akvujo la unuaj trinkos plej puran akvon.
- 21—Memoru, ke via tribestro havas multajn orelojn.
- 22—Morgaŭaj nuksoj ne satigos hodiaŭ.
- 23—Vi surgrimpos multajn arbojn, antaŭ ol vi kaptos la lunon.
- 24—Ne la lango, sed la manoj, plenigas la ventron.
- 25—Facile moki, kiam alia sidas en kaptilo.
- 26—Du batalas, kaj tria akiras la bananojn.
- 27—Multaj donos konsilon, ne multaj bananon.
- 28—Porkoj scias, kie troviĝas ignamoj.

In Austria Esperanto is making good progress. *Aŭstria Esperanto-Revuo* appears regularly (Neutorgasse 9, Wien I); also a propaganda magazine *Die Weltsprache* (Rossauerlande 27, Wien IX). Both these magazines are excellent of their kind. Both (we note with pleasure) have decided to revert loyally to the Zamenhofan system of land-names, though provisionally preferring *Aŭstrio* to *Aŭstrujo* for their own land. No good reason is given for this exception, but this is a matter for the Austrians themselves to decide. In addition to these magazines a series of illustrated posters (18in. by 23in.) is appearing regularly; these are widely posted on walls and in public places.

Can any reader supply for the B.E.A. Library copies for July–Sept. 1938 of *La Juna Vivo* (Holland)? They are unobtainable in Holland.

We were tempted to break the rules and listen for a few minutes during prohibited hours to Radio Luxembourg on the afternoon of 30th March, to hear the station give the Scout Motto *Estu Preta!* in Esperanto, with a letter from Mr. Murphy in Ipswich, and news of Czech Esperantist Scouts.

The firm "Tramondo" (Neutorgasse 9, Vieno I) wishes to publish a number of Esperanto works (translated and original) in Esperanto, and perhaps also in German.

(1) Literary contributions of all kinds (not tales of terror); (2) A large ethnographical work on post-war Europe; (3) An international literary Anthology. Contributions and promises of collaboration are asked for. We cannot print details here, but suggest that *verkemuloj* should write to the firm for full information.

MONOLOGO DE STENOTAJPISTINO

(We reprint this brilliant little parody in response to repeated requests)

Ĉu edziniĝi aŭ ĉu ne? Tiel staras
Nun la demando. Ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn batojn, ĉiujn sagojn
De la fraŭlina sorto, kaj restadi
Nur stenotajpistino (laborante,
Ho, ve! por edzo de aliulino),
Aŭ per la edziniĝo ilin fini?
Liberi—ami—kaj nenio plu!
Konscii, ke ni tiel tute finis
Laboron de la plumo—la mil zorgojn,
Herodon de la poŝto—tio estas
Tre dezirinda celo! Flirti—ami—
Edzini! Jes—sed eble eksedzini!
Jen la barilo! Kiaj malbonaĵoj
Viziti povas nian gevivadon
Post la forĵeto de rutinaj devoj!
Jen tio nin haltigas; tio faras,
Ke nia fraŭlineco longe daŭras.
Alie, kiu volus elportadi
La mokojn kaj kapricojn de la estro,
La premon de laboro, la fiŝercojn
De l' ĉefkomizo, polvon de la libroj,
Turmentojn de la bubo oficeja,
La katinecon, kiun ĉiu kolegino
Regalas al merito efektiva,
Haladzon de malkaraj cigaredoj
Malbonodorigantan ŝiajn harojn?
Jes, kiu volus tion ĉi elporti,
Se mem, per unu vorto ĉe la pastro
Ŝi povus sin de ĉio liberigi—
Por kuirejo ŝanĝi oficejon,
Por forno aŭ lulilo skribmaŝinon?
Kaj kiu do en ŝvito kaj en ĝemoj
La ŝarĝon oficejan volus porti,
Se ne pro tim' al riskoj kaj danĝeroj
De tiu nekonata land', el kiu
Neniu plu revenas, aŭ eskapas
Nur eksedziniĝante? Kaj pro tio
Plivolas ni elporti ĉion ĝenan,
Ol flugi al mizeroj nekonataj.
Ĉi tiu penso tenas nin fraŭlinoj.
La plej kuraĝa edzinemulino
Pro tiu kaŭzo haltas sendecide,
Kaj ĉio restas penso, sed ne faro.

A.E.M.B.

We offer (for the benefit of the B.E.A. Library) *Oficiala Gazeto* complete (except the last number, 82) and *La Revuo* I-VIII (complete), for £3-10-0 each (unbound). First offer accepted. Write to 36 Penrhyn Rd., Kingston-on-Thames.

Mr. W. Goodes (Argentine) is returning to England shortly, and asks that from the beginning of June all communications should be sent to him at 107 Sussex Rd., Petersfield, Hants.

S.B.E.T. PASKA LERNEJO

La ĉiujara "Lernejo" de SBET okazis ĉe 68 Windsor Crescent, Bridlington, Yorkshire, 5-12 Aprilo.

Tio estis mia unua sperto de kunveno tia, kaj mi konfesas, ke mi iom antaŭtimis pri la neceso paroli Esperanton dum tuta semajno, kaj mem fari paroladon. Tamen, la unua kunveno tute forigis mian timon. Mi baldaŭ konsciis, kian bonegan okazon oni tie havas por akiri fluecon. Ĉiu volis helpi la aliajn, kaj mem akceptis tute nature helpojn de aliaj. Multe helpis la diversaj programeroj: debato "Ĉu neŭtraleco estas ebla en la Esperanta movado?"; interparolaj rondoj; tradukado en grupoj; paroladetoj; diskutadoj; legado de Georgo Dandin en Zamenhofa traduko; posttagmezaj ekskursoj sur la marbordo, kaj komuna kantado. Aparte gravaj estis la specimenaj lecionoj de S-ro H. G. Toms, kaj diskutado enkondukita de F-ino Nixon pri "Internacia Organizo de Esperantistaj Instruistoj".

Unu tagon ni havis viziton de nia prezidanto, F-ino M. Jay, kiu bedaŭrinde ne povis resti pli longatempe. Ĉeestis ankaŭ afabla Franca kolego, S-ro Duthel el Lyons, kiu parolis pri la politika situacio en Francujo, kaj bonege ludis Georgo Dandin.

Oni tiel vere sentis sin en Esperantujo, ke, elirinte el la domo, oni havis la impreson esti kvazaŭ en fremda lando! Mi nun komprenas, kial la membroj entuziasme partoprenas la lernejon ĉiujare.

La programo finiĝis per societa vespero, kaj kantado de *La Fino de Perfekta Tago*. Vere tio estis la fino de perfekta semajno. Tre dankindaj estas nia sekretario F-ino Nixon, la komitato, kaj aparte F-ino Bowell, pro bonegaj aranĝoj: ankaŭ niaj gastigantoj kaj samideanoj S-ro Booth kaj lia ĉarma edzino pro la tre afabla maniero, laŭ kiu ili akceptis nin.

C. G. LOVE.

NASKIĜOJ

Philip—Je 21 Marto, al Ges. A. E. Philip, 16 Windsor Rd., Higher Compton, Plymouth (antaŭe en Norda Londono), tria infano, Heather.

Delgado—Je 1 Marto, al Ges. Delgado, Ratcliffe Culey, Anglujo, filino, Anlucia.

MORTOJ

Lawton—Je 9 Marto, Ernest H. Lawton, 78-jara, tre malnova kaj entuziasma Esperantisto. Li ageme laboris por multaj bonfaraj movadoj, kaj estis tutmonde konata kiel "La Kvakera Orgenfabrikisto".

Dodd—Je 23 Jan., Ald. Archibald Dodd, J.P., St. Helens, Membro de B.E.A. Li multe helpis la lokan movadon.

I.E.L. AND U.E.A.

The Association has received from the Internacia Esperanto-Ligo the following communication regarding the scheme devised last year for a fusion of that body with the Universala Esperanto-Asocio. It is hoped to afford an opportunity for discussing the subject at our Annual Meeting on May 25th.

BERNARD LONG,
Hon. Secretary, B.E.A.

Al la Landaj Asocioj aliĝintaj al I.E.L.

Ni havas la plezuron sciigi al vi, ke ĉe la kunsido de nia Estraro dum Pasko kontrakto pri kunfandiĝo de IEL kaj UEA estas subskribita. La ĉefaj principoj estas jenaj :

1. Estos nur unu Esperantista internacia organizaĵo (neŭtrala). Ĝi havos du oficejojn : centran oficejon por la administra laboro en Anglujo kaj alian por dokumentado kaj servoj en Svisujo.

2. La gazeto ek de Majo havos la nunan formaton de *Esperanto Internacia* sed la titolon *Esperanto*. Kun la escepto de la oficiala parto ĝi estos redaktata de S-ro Hans Jakob en Ĝenevo, sed ĝi estos presata en Anglujo.

3. Estos nur unu Jarlibro, en du partoj kiel kutime, redaktata kaj eldonata en Anglujo.

4. La Komitato konsistos el :

- (a) anoj elektitaj de la Landaj Asocioj aliĝintaj, kiel nun ;
- (b) anoj elektitaj de la Delegitoj el internacia listo (la VD kaj FD ne partoprenos tiun voĉdonadon) po unu komitatano por ĉiu 250 delegitoj ;
- (c) anoj, kiujn la komitatoj elektitaj sub (a) kaj (b) alektos ĝis kvarono de sia propra nombro (similaj al la ĝisnunaj komitatoj B).

5. La titolo de la nova Asocio estos *Universala Esperanto-Asocio*, kaj ni do reiras al la tradicia nomo.

Ĉiuj necesaj informoj pri administrado, korespondado, k.t.p., aperos en la gazeto por Majo kaj en la Jarlibro.

La Estraro tre atente trarigardis la Statuton por fari la aliigojn necesajn por konformigi ĝin al la Kontrakto pri kunfandiĝo, kaj ankaŭ por enmeti kelkajn plibonigojn, kiuj montriĝis necesaj laŭ la spertoj dum dek jaroj. Post nelonga tempo ni submetos por via aprobo la proponitan novan Statuton de la kunfandiĝinta Asocio. Ni sendas la nunan mallongan informon por ke, se baldaŭ okazos via jara kunveno, vi informu vian membraron, kiu espereble aprobos la finon de la skismo en nia movado.

Ĉar estas nepre necese, ke la Komitato estu pli-malpli kompleta je la dato de la venonta Kongreso, ni devos tre baldaŭ okazigi la voĉdonadon por la komitatoj sub 4 (b), eĉ neatendante la aprobon de la nova Statuto. Ni tamen havas nenian dubon, ke vi akceptos tiun ne tute laŭregulan agon, por ke en Bern la nova Komitato havu siajn unuajn kunsidojn, kaj ke tie la paco vere efektiviĝu.

C. C. GOLDSMITH,
8-an de Aprilo 1947 *Sekretario.*

THE BERN CONGRESS

The B.E.A. Travel Parties—Parties A and B are now both fully booked up.

Accommodation in Bern—The B.E.A. can book accommodation, so long as it is available, for members wishing to make their own travel arrangements.

Travel—The B.E.A. cannot undertake to procure tickets or advise on special itineraries. Please consult a Travel Agency.

32nd BRITISH ESPERANTO CONGRESS

Date—Whitsuntide, 24th–26th May, 1947.

Place—Imperial Hotel, Temple St., Birmingham.

Congress Fee—7/6 including Dance in the Connaught Room of the Imperial Hotel on the Saturday evening.

Enrolments—Over 120 members have joined.

Blinduloj—Free Congress tickets will be issued to all blind Esperantists and their guides. Will they please notify their intention of joining to Mr. W. Merrick, Penso, Shepperton, Middlesex.

The Programme—This was given in the March/April *B.E.*

Lodgings — Particulars regarding hotel accommodation are sent to all members on enrolment. Those who prefer accommodation in a

private house please write at once to Miss B. Bowell, 98 Middleton Hall Road, King's Norton, Birmingham 30.

Excursion — A delightful excursion has been arranged for Monday, the 26th, to Warwick and Stratford-on-Avon. Price, including meals, 19/-. Enrolments should be sent at once to the B.E.A. Office.

THE PRESS BULLETIN

The B.E.A. regularly sends out a Press Bulletin to over 160 newspapers, periodicals and important bodies. It is thought that many readers might wish to receive the Bulletin (which contains useful information for propaganda), and we will send 12 consecutive copies to any member subscribing 4/- for this purpose. This should also meet the wishes of many who have asked for notes helpful to speakers.

Air Taxi Service

ANYWHERE to ANYWHERE
AT ANY TIME ————— 1/3 per mile

Piloted by Ex A.T.A. Pilot (1,500 hours)

Full information and details from—

Naylor Air Service

Telephone :
LITTLEWICK GREEN
2 5 1

WHITE WALTHAM AIRFIELD
MAIDENHEAD, BERKS

MEMBER OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

Small Announcements

2d. per word. Minimum 2/- per issue. Prepaid. Copy must be received at our offices by the 6th of the previous month.

Monomark Service—Permanent London address. Letters redirected. Confidential. 4/- p.a. Royal Patronage. Write, Monomark, BCM/MONO5W London, W.C.1.

To Sussex Esperantists—Full stocks of all books in Esperanto kept. S. A. Hayward, Bookseller, 9 Station Street, Lewes, Sussex.

The Workers' Esperanto Movement (S.A.T.E.B.)—Esperanto with a purpose—world education for world socialism. Write for "The Worker Esperantist", the official organ, 3d. post free, to K-dino N. Walton, Summerfield, Wadsworth, Hebden Bridge, Yorks.

La Londona Esperanto-Spiritista Societo volonte ricevos de gesamideanoj raporton pri psikaj spertoj iliaj, se eble atestitaj. Skribu al—S-ino E. B. Knight, 270 Holly Lodge Mansions, London, N.6.

Amerika Esperantisto—1 year's sub, 6 issues, begin any month, post free 7/6. Essential to every Esperantist's propaganda kit. A lively, quality magazine. Order from The British Esperanto Association.

Socialist Guest House—Free and easy holidays in modernized, converted Farm House in beautiful Ribble Valley (Lancs.). Good and plentiful food. Home cooking. Tennis, Putting, Cricket, Croquet, Music, etc., etc. Easily accessible. 'Bus to gates. Full board from 70/-. Large stamped envelope for Brochure. Ni parolas Esperanton! "Clarion", Clayton-le-Dale, nr. Blackburn.

F. Azorin's Universala Terminologio de la Arkitekturo—Second-hand copies of this work are required. Offers (with post-free price desired) to Secretary, B.E.A.

British Officer corresponds in Esperanto—348050 Lieut. A. J. Cameron, c/o National Bank of Scotland, Inverness.

British League of Catholic Esperantists—Details from Hon. Sec., Norman W. Vigar, 43 Defrene Road, London, S.E.26.

Holidays on the South Coast—Aldrington Lodge, 26 Portland Avenue, Hove, 3. Full board, 3½ guineas per week, doubles; 4 guineas single rooms. Proprietors: Mr. and Mrs. J. Pearman. Ni ambaŭ parolas Esperante.

Hugo's German Course for sale—Write Paul Topham, 21 Weston Crescent, Bristol 7.

Mr. Mason Stuttard begs to inform authors and others that he does not give free advice on, or revise MSS. From now on such communications, if not accompanied

by return postage, will be ignored. Those with postage will simply be returned.

B.E.A. Literary Service—Send stamp for particulars of facilities offered to authors and students. B.E.A., 140 Holland Park Avenue, London, W.11.

"Bank-notoj por intersanĝo" — Kompleta serio de japanoj bank-notoj en Malajo de l'ed ĝis \$1000, por intersanĝi kontraŭ 40 uzitaj P.M. aŭ 4 internaciaj kuponoj. Adreso: K-do LuBi, Hou Chio Publika Lernejo, 897 North Bridge Rd., Singapore".

Typewriter—Reconditioned "Oliver" for sale. Standard alphabet with extra Esperanto letters. Best offer over £12. Can be seen 140 Holland Park Avenue.

Deziras korespondi—50-jara Esperantisto, pri ĉiuj temoj, i.a. pri teozofio. Adreso: A. H. Tähtinen, Vanha Koivisto 32, Pori, Finnlando.

Read "Youth Echo" 3d. 519 Barlow Moor Rd., Manchester, 29.

Deziras korespondi kun ĉiuj landoj malnova Litova Esperantisto Pulgis Andrusevičius, Weidenstr 1, Trossingen, Germanujo (French Zone).

Kie Loĝi?—Junaj esperantistaj geedzoj urĝe bezonas nemeblitan domon aŭ apartamenton—aŭ en, aŭ ne pli ol dudek mejlojn de Londono. Edzo estas studento ĉe Londona Universitato. Se oni povas helpi skribu al Ges. R. A. Newland, 32 Aldenham Avenue, Radlett, Herts., aŭ telefonu al Radlett 6632.

Why not Denmark?—Good food at Esperanto Summer Schools in Elsinore (17th–24th July, 1947) in Hadsten (27th July–2nd Aug., 1947). Chance to visit Copenhagen, and S.A.T. Congress in Aarhus (2nd–7th Aug., 1947). Details: Mrs. M. C. Major, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.

Books—Voice Culture, Mind-Training, Memory Efficiency, Psychology, etc. Wide range of Health Books. Stamp for list. From: BCM/Mailit, Monomark House, London, W.C.1.

Devon Holiday—Bed and Breakfast, 6/6 a day. Mrs. Firth, Millcombe, Black Awton, Totnes, S. Devon. Nearest station: Dartmouth.

Wanted: state price—(a) Internationale Sprachnormung in der Technik (Wüster 1931); (b) Pri problemo de internaciigo de Science-teknika terminaro (Drezen, 1935). H.J., 3 Sparelease Hill, Loughton, Essex.

Deziras korespondi—(1) Prof. Pavel Halic, Str. Miron Cpstin 6, Arad, Rumanujo. (2) S-ro Wencelo Kiss, Str. Regal N/474, Praid, Jud. Odorheiu, Rumanujo, kun vegetaranoj.

INTERNATIONAL COLLABORATION AMONG TEACHERS

Directly after the war, a need was felt for collaboration amongst Esperantist teachers in all countries. TAGE, the former international organization, has ceased to function. After six months' discussions between the Esperantist teachers' Societies in Britain, France, Holland, and Sweden, a provisional committee has been set up, consisting of Miss V. Nixon (Britain), Miss J. Dedieu (France), Mr. P. Korte (Holland), and Mr. Einar Dahl (Sweden), who will represent their national organizations.

This Committee will have a Central Information Office, run by Einar Dahl, Uddevalla, Sweden—under the title Centra Informejo, Internacia Instruista Kunlaborado (IIK)—to collect and distribute information on Esperanto in schools. Letters needing a reply **MUST** be accompanied by a reply coupon.

The Committee hope that other countries also will form teachers' societies. In the meantime it is compiling a list of professional teachers willing to act as agents in countries where no national teachers' group exists, who will endeavour to form such groups, and be points of contact. This list will be published as soon as possible. The publication of a bulletin is also being considered.

Official Notices

THE BRITISH ESPERANTO ASSN. INC.

President : Miss Margaret Jay, M.A.

Hon. Secretary : Bernard Long, B.A.

Hon. Treasurer : A. Venture.

Secretary : R. B. Wilkinson.

Education Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.

Registered Office : 140 Holland Park Ave., London, W.11. *Hours*—Weekdays : 9 a.m. to 5.30 p.m. Saturday : 9 a.m. to 12.30 p.m. *Telephone :* PARK 7821.

NEW MEMBERS

Abbott, Miss M.	<i>Stroud</i>
Abramson, H. L.	<i>London, N.10</i>
Adams, Miss D. M.	<i>Sheffield</i>
Atherton, W. H.	<i>Derby</i>
Auld, W.	<i>Glasgow, S.W.2</i>
Baird, Miss A. D.	<i>Edinburgh 5</i>
Baird, Miss J. M.	<i>Edinburgh 5</i>
Barrett, Miss O.	<i>Bristol</i>
Beever, Mrs. E. Van	<i>Greetland, Yorks.</i>
Benoy, K. F.	<i>Plymouth</i>
Berry, Mrs. E.	<i>Leeds</i>
Berry, P.	<i>London, W.2</i>
Blance, W. H.	<i>North Shields</i>
Bolton, Miss A.	<i>Nelson, Lancs.</i>
Bulenda, P.	<i>Whitchurch, Shrops.</i>

Burnell, C. F.	<i>Bristol</i>
Burnett, Miss G. M.	<i>Bristol</i>
Byrne, Miss M.	<i>Dublin</i>
Caldwell, Miss C. S.	<i>Helensburgh</i>
Caldwell, Miss M. W.	<i>Helensburgh</i>
Cardy, Mrs. D.	<i>London, S.E.2</i>
Carter, Miss E. A.	<i>Margate</i>
Challinger, J. K.	<i>Castleford, Yorks.</i>
Chalmers, W. G.	<i>Wembley, Middx.</i>
Chappel, J. A.	<i>Wallington, Surrey</i>
Claxon, A. E.	<i>Shipley, Yorks.</i>
Clayton, P. W.	<i>Grimsby</i>
Cooke, M. A.	<i>Bristol</i>
Crook, W. H. J.	<i>Bristol</i>
Davie, Miss J. P.	<i>Prestwick</i>
Davie, Miss L. C.	<i>Prestwick</i>
Deacon, Miss M.	<i>Liverpool 17</i>
Downer, Miss G.	<i>Torquay</i>
Downer, Miss L. G.	<i>Torquay</i>
Duckett, T. E.	<i>Bristol</i>
Farr, Mrs. G. E.	<i>Barry, S. Wales</i>
Forber, Miss I.	<i>St. Helens</i>
Foulds, Mrs. R.	<i>Matlock, Derbyshire</i>
Fulford, Miss D.	<i>Bristol</i>
Griffin, Miss F.	<i>Bristol</i>
Hargreaves, Mrs. L.A.	<i>Chaddesden, Derby</i>
Hattersby, C. M.	<i>Mexborough, Yorks.</i>
Hirst, A. E.	<i>Huddersfield</i>
Hockey, Miss M. J.	<i>Birmingham 20</i>
Hoe, W. L.	<i>Lincoln</i>
Hughes, F. C.	<i>Peterborough</i>
Hulson, Miss M. E.	<i>Weston-super-Mare</i>
Jones, Mrs. L.	<i>Lee-on-Solent, Hants.</i>
Kersley, Miss E. M.	<i>Leigh-on-Sea, Essex</i>
Kew, Rev. F. A.	<i>Bristol</i>
Kew, Mrs. F. A.	<i>Bristol</i>
Kew, Miss J. D. H.	<i>Bristol</i>
Kew, N. H.	<i>Bristol</i>
Kolatshevsky, N. J.	<i>London, N.19</i>
Lake, Miss N.	<i>Weston-super-Mare</i>
Lyons, J. D. M.	<i>London, E.17</i>
Lysowicz, C.	<i>B.A.O.R.</i>
MacArthur, A.	<i>Aberdeen</i>
Mapstone G. E.	<i>Weston-super-Mare</i>
Monks, F.	<i>Bristol</i>
Monkcom, H. L.	<i>Portsmouth</i>
Morgan, Miss B. E.	<i>Birmingham 20</i>
Nayler, Miss J. E.	<i>Maidenhead</i>
Osmond, Miss K.	<i>Weston-super-Mare</i>
Paget, B. L.	<i>Weston-super-Mare</i>
Parker, Miss B. M.	<i>Beckenham, Kent</i>
Paul, Miss M. J.	<i>Weston-super-Mare</i>
Phillips, Miss D.	<i>Bristol</i>
Phillips, Miss J.	<i>Bristol</i>
Powell, Miss G.	<i>Bristol</i>
Powley, S. A.	<i>Dunstable</i>
Priestley, H. E.	<i>London, E.13</i>
Quist, D. I. K.	<i>Hohoe (B. Togoland)</i>
Reardon, G. M.	<i>West Wickham, Kent</i>
Robins, Miss I. G.	<i>Birmingham 20</i>
Rogers, Miss E.	<i>Southport</i>
Ross, J.	<i>Offaly, Eire</i>
Shaw, J.	<i>Warrington</i>

"LITERATURA MONDO"

PUBLICATIONS

All Esperantist Book Lovers will welcome the reappearance of these choice works. Albeit, supplies are short. Delivery from stock, if possible; otherwise, one month if still obtainable.

Order at once by postcard and pay on delivery. Postage free on all orders of £2 or over.

			p.
Argenta Duopo.	1a volumo. Kalocsay-Baghy	broŝ.	7 6
Svisa Antologio.	Red. A. Baur	bind.	26 6
Rimportretoj.	K. Kalocsay ..	broŝ.	2 6
Pri l'Moderna Arto.	Grenkamp-Brzekowski	bind.	6 0
La Juda Ŝtato.	Herzl-Selzer	broŝ.	5 0
Auli.	Adamson	broŝ.	3 6
El la Verda Biblio.	I. Lejzerovicz	bind.	4 0
Maria kaj la Grupo.	Emba	broŝ.	6 9
Leteroj al Juna Poeto.	Rilke-Münz	bind.	3 0
Tri Homoj en Boato.	Jerome (Badash) broŝ. 8s. 3d.	bind.	10 6
Amo de Toofuuro.	Kikuĉi (Ŝimomura)	broŝ.	2 6
Bakŝiŝ.	L. N. Newell	broŝ.	6 9
Tur-strato 4.	H. Weinhengst	broŝ.	6 9
Infero.	Dante (Kalocsay)	bind.	14 6
Viktimoj.	Julio Baghy	broŝ.	6 9
Lingvo, Stilo, Formo.	K. Kalocsay	broŝ.	3 6
Streĉita Kordo.	K. Kalocsay	broŝ.	6 9
Eterna Bukedo.	K. Kalocsay	broŝ.	13 6
Arthistorio I.	K. Kalocsay	broŝ.	16 6
Parnasa Gvidlibro.	Kalocsay-Waringhien	broŝ.	6 0
De Paĝo al Paĝo.	Tárkony (Totsche)	bind.	6 9
Dekdu Poetoj.	K. Kalocsay	bind.	6 9
Fine mi komprenas la radion.	E. Aisberg	broŝ.	8 0
Cezaro.	Jeluŝiĉ-Rotkviĉ	broŝ.	16 0
Ĉeĥoslovaka Antologio.	Diversaj	broŝ.	23 6
Romano de San Michele.	Munthe (Weleminsky)	broŝ.	16 0
Verkaro de Fez.	Wiesenfeld ..	broŝ.	11 6
Rigardu la Teron.	Van Loon (Saville)	bind.	27 6

(Owing to the prevailing difficulties in Hungary, some of the books have plain bindings)

Order from

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)
140 Holland Park Avenue, London, W.11

B.E.A. ESPERANTO SUMMER SCHOOL SURREY CREST

AUGUST 30th TO SEPTEMBER 13th

Lectures, discussions, tennis (hard-court), rambles, indoor games.

Beautiful countryside, within 20 miles of London.

£4 per week. Single weeks may be booked.

Rooms for 2 persons; single beds; limited to 30.

For full particulars, write to the Organizer for the B.E.A.—

S-ro W. A. GETHING, B.Sc. (Econ.),
F.B.E.A.

62 Carlton Crescent, Luton, Beds.

Enclose stamp for reply.


for

Printing
Bookbinding
and
Stationery

consult

The Printer of this
Magazine

TELEPHONE
EASTBOURNE 611



**Esperantaj vizitantoj al la 32a Universala
Kongreso en Berno, kaj ĉiuj vojaĝantoj
kaj libertempantoj.**

Po kelkaj ŝilingoj vi povas asekuri vian pakajon kontraŭ perdo kaj difektiĝo, ankaŭ vin mem kontraŭ akcidento. Bonvolu havigi informon pri la porvojaĝanta poliso de la "Norwich Union". Ĝi ebligas libertempon senzorgan.

Kompleze uzu la kuponon ĉi-kune.

NORWICH UNION
INSURANCE SOCIETIES

Mi petas informon pri via porvojaĝanta poliso.

Name

Address.....

32 Surrey St.
NORWICH
Norfolk